

antaŭas ĝin en la vico, kaj kiu do havas priorecon. La nomo »Balaena Boops« do ankaŭ forfalas kiel valida nomo.

9. La specio »Balaena Musculus« longe restis nebula. Temas pri specio kiun la brito SIBBALD estis vidinta en 1692. ĉe la Skota marbordo. Nur en 1898. TRUE povis klare indiki ke la specio de SIBBALD estis la tre granda blua rorkvalo, por kiu oni jam estis elpensinta tiom da nomoj. Ĉiuj

tiuj nomoj do forfalas favore al la prioreca nomo de LINNAEUS, krom la modifo ke la specio nun apartenas al la genro *Balaenoptera*. La nomo do estas nun: *Balaenoptera musculus* (LINNAEUS).

Resume oni do povas diri ke el la 12 specioj de cetacoj kiujn LINNAEUS citis en sia deka eldono de la »Systema naturae« (1758.) restis nur 8, kaj ke el ili nur 4 konservis pli malplian, dum 4 aliaj havas alian genran nomon nun.

SCIENCA REVUO de Internacia Sciencia Asocio Esperantista (BEOGRAD, Jugoslavio)	El Vol 22 n ro 1 (87) 15. 2. 1971.
--	--

KONTRIBUO DE ŜUMIROJ AL LA HOMARA CIVILIZO

(J. Chvosta, Podebrady, Ĉeĥoslovakio)

La lando inter grandaj riveroj Eŭfrato kaj Tigriso havis dum la historio multajn nomojn. Nuntempe ĝi estas parto de la ŝtato Irako. Sed unu nomo restas daŭre: MEZOPOTAMIO. Tiu ĉi nomo estas greka, ĝi signifas: Lando inter riveroj.

Tiu ĉi nuntempa provinco de Irako estas ebena, tre vasta. Tri kvaronoj estas stepo, kiu ie ŝanĝiĝas je grazflava dezerto. Nur la reston formas arboj kaj boskoj, en kiuj estas kulturataj mondkonataj daktiloj. Norde la dezerto donas al la homaro nafton. La grandaj riveroj, kiuj kunfluas ankoraŭ antaŭ la enfluo en la Hindian Oceanon, superakvigas regule la teron kaj liveras vivodonan akvon al la stepo. Tiel okazis antaŭ jarmiloj kaj tiel okazas eĉ nun.

Pri Mezopotamio en la meza epoko sciis ĉiu Eŭropano: pri ĝi skribis grekaj sciencistoj Herodoto kaj Strabono, pri ĝi parolis la Biblio, kiu nomis

multajn urbojn, nepre tie estis la biblia paradizo, kie vivis la unuaj homoj, tie suferis la judoj en babilona kaptiteco, oni konis multajn tiranojn de tiu lando. Spite al ĉiuj konoj nemultaj mezepokanoj eniris tiun ĉi landon kaj ĉefe revenis vivaj el ĝi. Neniu vizitis la restojn de gloraj urboj, pri kiuj ĉiu estis informita en la Biblio. La mezopokanoj nenion sciis pri la samtempa Mezopotamio, kiu estis tute nealirebla por ili. Al la fino de la meza epoko oni jam pli multe sciis pri Afriko, pri la Nova Mondo ol pri Mezopotamio. Nur en la deka jarcento la anglaj kaj francaj diplomatoj, kiuj krom siaj diplomataj taskoj interesiĝis ankaŭ pri historio kaj arkeologio, komencis pli detale studi la historion de la lando kaj kompletigi la malmultajn informojn de mezopokaj aventuristoj, kiuj feliĉe penetris tien. Kaj la ĉefaj malkovroj pri la malnova epoko de Mezopota-

mio okazis nur en la deknaŭa jarcento. La franca konsulo Pol Emil Bota (Paul Emile Botta) trovis multajn statuojn en la somera rezidenco de la asiria reĝo Sargon II-a, kiu regis en jaroj 721 — 705 a. Kr. Li malkovris palacon en la epoko, kiam ankoraŭ neniu sciis ion pri Ateno aŭ Romo! Unuafoje la Eŭropanoj admiris la statuojn kaj aliajn monumentojn de aliaj nacioj krom Grekoj, Romianoj kaj Egiptoj. Bota ne sukcesis transporti ĉiujn monumentojn en Francion, ĉar kelkaj statuoj pezis pli ol tridek tunojn.

Bota verkis libron pri siaj malkovroj kaj fondis tiamaniere la asiriologion.

Post la francoj daŭrigis ankaŭ la angloj en elfosadoj kaj nelonge post Bota malkovris Ostin Henri Lajar (Austen Henry Layard) la fundamentojn de la konata malnovepoka urbo Ninevo. Pri tiu urbo ja skribis la biblio, sed neniu mezepokano konis ĝin. La sciencistoj eĉ ne kredis, ke Ninevo ekzistis, ke tio ne estas nur mito de biblia verkisto. Ankaŭ Layard verkis libron pri siaj malkovroj.

La sukcesaj elfosadoj vekis intereso kaj envion de aliaj. Post la francoj kaj angloj germanoj komencis elfosadi en Mezopotamio kaj la muzeo en Berlin havas multajn memorindaĵojn el tiu epoko. Sed la elfosadoj vekis eĉ interesojn de tieaj nekleraj oficistoj kaj soldatoj, kiuj ankaŭ strebis pliriĝi aŭ pro fanatikeco malhelpi la elfosadojn, ĉar ili estis fanatikaj mahometanaj religianoj kaj tie oni elfosis en ilia lando «iajn paganajn idolaĵojn».

Krom multaj statuoj, monumentoj kaj aliaj objektoj oni malkovris grandan kvanton da argilaj tabuletoj, sur kiuj estis tiaj ornamantoj. Neniu sciis, ĉu estis ornamantoj, ĉu estis literaro.

El Egiptio oni ja konis hieroglifojn, kiuj estis bildetoj, sed sur la tabuletoj oni ne trovis bildetojn. Estis «kvaŭzaŭ postsignoj de birdoj, kiuj kuris sur malseka sablo». Sed ĉar tiuj ĉi ornamantoj troviĝis ne nur sur tabuletoj, sed eĉ sur monumentoj, konstruaĵoj, statuoj kaj domegoj, oni supozis, ke temas pri literaro, Anglo Tomas Hajd (Tomas Hyde) nomis ĝin «kojnaj literoj». La asiriologoj havis multajn materialojn kun kojnaj literoj, sed oni ne kapablis legi ilin. En tiu tempo jam la egipta literaro estis solvita. Kleraj homoj interesiĝis pri novaj malkovroj kaj en Germanio unu instruisto Georg Fridrih Grotnfeld (Georg Friedrich Grotenfeld) vetis pri solvo de kojnaj literoj. Li havigis materialon kun kojnaj literoj kaj sukcesis diveni signifon de dek literoj. Li sendis sian teorion al la akademio en Getingen (Göttingen), sed neniu atentis ĝin, eĉ kiam la ekstrakto estis publikigita en la jaro 1802. La laboron de multaj sciencistoj pri la problemo de kojnaj literoj finis Henri Kresuik Rolinson (Henry Creswick Rawlinson), kiu en la jaro 1957. prelegis publike pri legado de kojnaj literoj. Ekde tiu tempo oni komencis detale studi asirian kaj babilonian lingvojn, oni fiksas epokojn de la evoluo kaj trastudis la tutan alireblan kojnjan literaturon. Oni ekkonis, ke la kojnaj literoj uzadis eĉ aliaj nacioj kaj aliaj lingvoj sed oni ne trovis la komencojn de tiu literaro. La literaro jam estis kiel preta objekto, la literaro ja estis komplika, estis en ĝi multaj literoj, kiuj havis plurajn signifojn, ĉar ili funkciis ne kiel vortoj, sed kiel simboloj por diversaj specoj, ekzemple ekzistis litero, kiu estis simbolo por lando,

SCIENCA REVUO	El Vol 22
de Internacia	n-ro 2 (88)
Scienca Asocio	5. 4. 1971.
Esperantista	
(BEOGRAD, Jugoslavio)	

LA NOMOJ DE LA CETACOJ

(dua parto)

(W. de Smet, Kalmthout, Belgio)^(*)

5. Kelkaj kazoj de komplikaĵoj en la sciencaj nomoj

Por ilustrati kiel la nomoj de la cetacoj renversiĝis dum la jardekoj, ni prenos kelkajn ekzemplojn. Similaj kazoj troviĝas cetere tra la tuta animalaro.

I. En 1804. la angla sciencisto SOWERBY trovis ĉe la angla marbordo la kadavron de stranga cetaco, kiu havas nur du dentojn, ambaŭ en la malsupra makzelo. Li priskribis ĝin kaj nomis ĝin *Physeter bidens*, opinante ke ĝi estas reprezentanto de la genro *Physeter*, al kiu apartenas la kaĉaloto. Sed en 1817. BLAINVILLE opiniis ke tiu animalo estas delfeno kaj nomis ĝin *Delphinus Sowerbensis*, tiel jam enkondukante eraron en la

nomo de SOWERBY. Aliaj imitis tiun kutimon, uzante kiel specian nomon: **Sowerbensis, Sowerbyi, Sowerbaei, sowerbi, sowerbiensis, sowerbyensis**, kaj lokigante la animalon en aliajn genrojn; **Diodon, Anodon, Heterodon, Ziphius, Micropteron, Nodus** k. t. p. Aliaj opiniis ke la animalo ne estas konigita de SOWERBY, sed ke jam en 1732. la anglo DALE rakontis pri ĝi; tial ili proponis la specian nomon **Dalei**. Ne devas miri ke HERSHKOVITZ povas citi 23 diversajn sciencajn nomojn por tiu cetaco!

La nomaro de tiu specio eĉ estas per pli granda ol tiu dudektrio, se oni enkalkulas ĉiujn variaĵojn per aldono de la aŭtoro nomo. Tio povas esti ilustrata per la sekvanta vico, kiu koncernas la nomojn per kiuj oni citis unu ekzempleron de tiu specio, kiu surstrandigis en Oostende (Belgio) en 1835. (vidu detalojn pri tio en la

(*) d-ro en zoologio, Wilgendreef 14, Heide, KALMTHOUT, Belgio